

# ESPERANTO-MIDI-PYRENEES (FEDERACIO) JARRAPORTO DE LA JARO 2018-2019

## 1. Regiona kunordigado

---

*Membraro (kluboj, individuoj) kaj evoluo...*

*Federaciaj kunsidoj, kongresoj...*

*Rilato kun UFE, partopreno en landaj instancoj (ekz. interfederacia konferenco)...*

**La membraro** evoluis de 95 ĝis 93 (16 el CEEA, 55 el EKC, 12 de Esperanto-Tarn, plus 10 individuaj membroj de UFE). Kvindeko da membroj estas en pluraj listoj aŭ ne loĝantoj de la regiono.

La asocio ne estis reprezentata dum la 3 **ufe-komitatkunvenoj** de 2018-2019, kiu ne repagis la kotizojn de la individuaj membroj.

Estis 2 **kunsidoj en Tuluzo kaj Montpeliero** antaŭ aŭ post la staĝoj por ĉefe interŝanĝi informojn inter la aktivuloj de la federacio de Midi-Pyrénées kaj Languedoc-Roussillon, sed tamen 1 projekto efektiviĝis kune kaj skale de la regiono Okcitanio = la portalo.occeo.net, kaj 2 aliaj komunaj projektoj estis proponitaj.

**Nia jarkunsido** okazis la 08/12/2017 en Graulhet, okaze de la Esperanto-festo. Partoprenis 6 personoj, el 3 departementoj.

En la **komitato** membras Françoise Eriksen (31), Alain Casiez (09), Jorgos Comte (09), Gilbert Darrieux (65), Marc Roger (31), Marion Quenut (31), Bernard Legeay (12), Michel Metzger (81), Christophe Chazarein (31) et Francis Bidault (81)

Marion sendis la konvokilojn al la Komitatanoj kaj la membroj de EKC kaj redaktis kaj kolektis la raportojn.

## 2. Informado kaj komunikado

---

*Federacia gazeto, federacia retejo...*

*Informa materialo...*

*Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.)...*

*Partopreno en landskalaj kampanjoj...*

Niaj retaj paĝoj kuŝas en la **portalo** <http://Esperanto-midipyrenees.org>. La unua fazo de la projekto pri nova portalo de la regiono Okcitanio PM okazis en Septembro 2018. Marion kaj Florian el Montpellier laboris kaj rete renkontiĝis 3-foje pri la projekto. La portalo ekde tiam gastigas ankaŭ paĝojn pri Langvedoko-Rusijono. Estas paĝo pri la federacio (ĝisdatigota), paĝoj laŭ asocio, kaj aparta retejo nun por Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo. Restas iom da laboro. La nomo de la retejo baldaŭ ŝanĝiĝos. Eblas krei kiel por Tuluzo apartajn retejojn. En la blogo Cirkulero, publikiĝis 5 artikoloj en 2017-2018. La portalo kostas ĉirkaŭ 20€ jare por la federacio, 40€ entute (jam pagita ĝis 2020. La federacio Langvedoko-Rusijono repagos en 2019 kaj 2020, duonon de la jara kosto.

Nia asocio havas **informbultenon** kiu aperis nur unufoje (Januaro): la « Cirkulero de Midi-Pyrénées », sendita papere al ĉiuj membroj, kune kun la Krokodil' de EKC ; pasintjare, nia asocio pagis por la sendado kaj la printado. EKC zorgis pri la sendado. En ĝi ĉefe kuŝis diversaj aliĝiloj, kaj informo pri abonklubo kaj la korusa staĝo.

La asocio Espéranto Tarn partoprenis kiel kutime la organikan foiron Biocybèle. Pri EKC, legu la apartan raporton.

En Tarbo, eta grupeto da interesitoj, sed ne plu asocia aktivo. Tamen, danke al Gilbert, artikolo aperis pri akcepto de kuŝbiciklanto okaze de lia vizito. Gilbert kaj Françoise zorgas pri stando en asociforomo.

Ne estis aparta ago de nia federacio por **konigi Esperanton en la regiono** (en la departementoj

sen asocioj, kiel antaŭ pluraj jaroj en Montalbano kaj Kadurko).

### **3. Instruado kaj ekzamenoj**

---

*Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj...*

*Ekzamensesioj federaciaj aŭ klubaj, nombro da ekzamenitoj...*

**Kursoj** pli malpli regule okazas iniciate de lokaj asocioj.

Tri **semajnfinaj kursoj** okazis en Arrout (Arieĝo), organizitaj de EKC (inter 15 kaj 23 partoprenintoj el la teritorio de nia federacio kaj el pli foraj lokoj). Pri aliaj kursoj de Arieĝo, vidu la raporton de CEEA.

En Tarno, estis kurso kun 6 personoj en Graulhet. En Tuluzo, vidu la apartajn raportojn de EKC pri kursoj kaj Ekzameno.

En Tarn et Garonne, esperantisto kadre de « Les Francas » gvidis plurajn atelierojn por infanoj kaj plenkreskuloj.

En Agen d'Aveyron, Bernard gvidis kurson kadre de loka asocio por 2 homoj.

### **4. Kulturo kaj aranĝoj**

---

*Prelegoj, prelegturneoj, renkontiĝoj, festoj, ĝemelklubaj aranĝoj...*

*Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj...*

La **tradicia Esperanto-Festo** kunvenigis en Graulhet, la 9an de decembro 2018, tridekon da esperantistoj el la regiono, kun vizito de graulhet, koncerto de Noubalòcha, spektado de filmo, anoncoj, foiro de asocioj, libroservo, diskoservo.

Pri aliaj aranĝoj kaj agadoj en Tuluzo, vidu la raportojn de EKC. Eurokka estis partnero de la lasta koncerto de « Brel en esperanto » kadre de SEMEO en Marto.

Por Arieĝo, vidu la raporton de CEEA.

Marion